

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 12

Decembro, 2011

Kara Leganto, estas nia honoro anonci, ke d-ro Leszek Kordylewski estis elektita kiel prezidanto de la Esperanto Societo de Ŝikago por la sekvantaj du jaroj. Prezento de la freŝbakita gvidanto kune kun la teamo okazos dum la Zamenhofa tago (legu malsupran informon).

Delonge la Societo ne akceptis gastojn, kaj por ni ĉiuj estis double agrable renkonti samideanon, agantan sub la ĉielo de la mondo.


La frandaĵo de ĉi numero – originala poemo de Petro Palivoda, poeto el Kijivo – ukraina ĝemelurbo de Ŝikago. Ĝuu!

–La Redakcio

Zamenhofa Tago: La Zamenhofa Tago'11 okazos la 18an de Decembro sur la Ŝuista placo de Malnova urbo (Cobbler Square, 1350 N Wells St., Old Town, IL 60610) en la gastsalono dum tradiciaj horoj: tagmezo – 4:00 pm. Apude situas du vagonarstacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark & Division (Ruĝa linio). Prezo kutima – ĉ. \$20. Pri via partopreno nepre informi Viktoron telefone (773) 344-2276 aŭ rete araneoesp@yahoo.co.uk. Bonvolu ne malfruiĝi, ni ja atendas gravegajn gastojn. 344-2276.



Esperanta Nepalo



Nian lastan kunvenon partoprenis s-ro Mukunda Patik (sur la foto), samideano de malproksima azia lando, kie kuniĝas tero kaj ĉielo, – Nepalo. Li ĉefdelegito de UEA, prezidinto de la Landa Esperanta Asocio, lerta esperantisto kaj fervora aganto. Laŭ fako li estas instruisto de Tribhuvan Universitato, fakultato de internaciaj lingvoj kaj instruas nepalan lingvon al eksterlandanoj. Li ankaŭ verkis diversajn librojn pri Esperanto, nepala literaturo, poemojn, kantojn kaj artikolojn por ĉefaj tagĵurnaloj de Nepalo. Nun s-ro Mukunda instruas IL-on al ĉ. 1000 (!) geesperantistoj.

Kun senkaŝita intereso ni aŭskultis pri la historio kaj pri la nuntempa vivo en Nepalo – lando, kiu, laŭ lia raporto, similas al agrabla paradizo, plena de la naturaj belaĵoj kaj antikvaĵoj, kie loĝas afablaj homoj. La plej alta monto de la mondo, Everesto, troviĝas tie (vd la foton). Nepalo estas lando de festivaloj, havantaj multkulturan sistemon kaj respektas ĉiujn relegiojn de la mondo. Alloke, Budho naskiĝis en Lumbini – urbo en la sudo de Nepalo apud la limo kun Barato. Ĝi estas la naskiĝloko de Siddharta Gautama, la fondinto de la Budhismo, kiu vivis

de 623 ĝis 543 antaŭ Kristo. Lumbini estas unu el la kvar plej gravaj pilgrimejoj rilate al la vivo de Budho. Lumbini (vd la foton) estas ekde 1997 en la Listo de mondheredaĵoj de UNESKO.

Estis interese ekscii direkte de la loka nacio pri la modernaj ŝanĝoj en la transformiĝanta nepala societo, en kiu virinoj nur ne antaŭ longe gajnis egalrajtecon. Sed dum la lastaj jardekoj aperis nova serioza problemoj de la senhejmaj stratinfanoj, en kies resociiĝaj programoj s-ro Patik agas.

Nia vizitinto rakontis ankaŭ pri la impresa kresko de intereso pri Esperanto en Nepalo kaj pri la ĝojiga plifortiĝo de la azia movado. Jen estas kelkaj interesaj faktoj. E-o venis en Nepalon en 1957 danke al emo de Tibor Sekelj (vd la temon de januara kunsido): la IL do jam kreis sian pli ol 50-jaran historion en tiu lando. Dum sia vojaĝo T. Sekelj instruis E-on al kelkaj unuloj. Tio rezultis en fondiĝo de Katmandua E-societo. Poste venis Simo Milojeviĉ, kiu dum 8 monatoj instruis al pli ol 200 studentoj. En la jaro 1990, kiam esperantiĝis nia gasto,



la nepala movado denove trovis freŝan energion, kiam venis Joachim Werdin (Pollando) por instrui IL-on en Katmando. Lingva instituto Quest disponigis salonon, kie lernis proksimume 100 homoj. Je la fino de la kurso novaj lernantoj fondis la Nepalan Esperanto-Asocion. Poste estis aranĝitaj kursoj en aliaj urboj, okazis (1991) la unua

kongreso de NespA, ekaperis bulteno "Montejo". En 1994 oni ekverkis la unuan "Nepala-Esperanta vortaro" -n (eld. en 2009), de ĉi jaro nepalaj gesamideanoj regule partoprenas UK-ojn. Ok nepalanoj partoprenis la 96an UK-on en Kopenhago (2011). De 2002 la loka E-junularo agas sub la standardo de la NEJO – Nepala E-Junulara Organizo, oni eldonas propran bultenon "Templo".



En 1995 okazis la unua Himalaja Renkontiĝo, kiu venigis dekojn da gesamideanoj el diversaj landoj. La tradicio okazigi ĝin en ĉiuj du jaroj daŭras: la 9-a IHR okazis ĉi jare. Krome, oni devas mencii pri la 4a Azia Kongreso de E-o (2005), kiun partoprenis 171 geE-istoj. Oni baldaŭ havos tie la sud-azian Esperanto-renkontiĝon.

La aktivado de la orientaj samideanoj evidente malvalidigas la iaman falsan onidiron de Esperantaj kontraŭuloj, ke nia lingvo estas sole eŭropa fenomeno, malutila modskale. S-ro Patik kaj liaj sekvantoj klare pruvas ke Esperanto taŭgas eĉ en la fora "Tegmento de Mondo". Dankante pro la donacitaj al la E-Societo de Ŝikago belaj informafiŝoj kaj videodiskoj, ni elkore deziras al s-ro Patik kaj al ĉiuj nepalaj kaj aziaj esperantistoj daŭran prosperon!

–L. Kordylewski, V. Pajuk

(preparante la artikolon estis uzitaj materialoj el Vikipedio)

Muziko



Solviĝos en muzik' esenco mia,
per ondo kolizias kun etero,
leviĝas super falso, super vero
kaj perdas originon materian.

Foriĝos por eterne homaj limoj,
al mi etendas manojn milionoj.
Fluadas mi – jen bono, jen malbono,
venen', balzam' inspiras la animojn...

...Vizi' degelis, estas mi en ordo,
la samaj kavaj vangoj, sekaj lipoj...
Violonisto arĉas jam ne kordojn,
sed miajn ripojn.

–Petro Palivoda, Kijivo, Ukrainios

Anonco:

Agentejo "Esperantotur" proponas vojaĝon al 79 Itala E-Kongreso 20-26.08.2012 en Mazara del Vallo, Sicilio, tra Pollando–Ĉeĥio–Aŭstrio–Italio–Francio–Italio-ev.Malto,Tunezio–Vatikano–San Marino–Slovenio–Hungario–Slovakio–Pollando (12-31.08.2012). Bv kontakti: esperanto-turismo@wp.pl.

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

18an de Decembro – Zamenhofa Tago '11 sur la Ŝuista placo de la Malnova urbo (Cobbler Square, 1350 N Wells St., Old Town), kiel kuirarto estis elektita mediteranea, de Jordanio, ĉefurbo de kiu estas ĝemelurbo de Ŝikago

24an de Januaro – vivon kaj agadon de Tibor Sekelj prezentas V. Pajuk

28an de Februaro – Sepideh Laal: "Persujo, patrolando mia!.."